

Novembro 2022

---

*ESPERANTO-INFORMILO*

---



Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Esperantujo kaj Politiko
- Literaturaĵo
- Diversaĵoj

La novembra kaj decembra eldono de la Esperanto-Infomilo aperas provizore redaktita de mi (Georgo). Por la venonta jaro ni nepre bezonus novan redaktoron aŭ redaktoran teamon. Mi deziras bonan legadon.

**Kolofono**

redaktoro: Georg Hennemann  
(GH) [ghennemann@gmail.com](mailto:ghennemann@gmail.com)  
korektinto: Ulrich Fellmann

**Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main**

[www.esperanto-frankfurt.de](http://www.esperanto-frankfurt.de)

Vorsitzender: Georg Hennemann

Rehgartenstr. 16

35683 Dillenburg

Tel. 02771-8196614

**Bankverbindung:**

Esperanto-Gesellschaft F.a.M  
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01  
BIC: DRESDEFFXXX  
bei: Commerzbank Frankfurt

**Jahresbeitrag** mit

DEB-Beitrag: 96 €  
Familienmitglied: 48 €  
Nur ESF: 24 €  
Familienmitglied: 12 €

## Programo

Klubvesperoj

Klub-Abende

Dienstag, d. 1. Nov. 22

mardon, la 1-an de nov. 22

19:00 h per Zoom

19:00 h per Zoom

Offene Sprachrunde

Malfermita babila rondo

Dienstag, d. 8. Nov. 22

mardon, la 8-an de nov. 22

19:00 h per Zoom

19:00 h per Zoom

Geschlossene Sprachrunde (nur Mitglieder)

Fermita babila rondo (nur klubanoj)

surloke:

Saalbau MÜZ Schönhof  
Rödelheimer Str. 38  
60487 Frankfurt

Dienstag, d. 15. November 22

mardon, la 15-an de nov. 22

18:30 h

Sprachrunde: (Anina Stecay)

19:30 h

Vortrag: Reise nach Norwegen (Martin Schmitt)

18:30 h

Lingva rondo: (Anina Stecay)

19:30 h

Prelego: Vojaĝo al Norvegio (Martin Schmitt)

### Atentu:

La KER-Ekzameno en Herzberg la 26-an de Novembro estas nuligita, vidu

<https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

## El la Klubo

Naskiĝtagoj

**En novembro festos sian naskiĝtagon:**

Ni kore gratulas!

Frank Lappe, 12.11.

**Ni bonvenigas novan ESF-klubanon en niaj vicjoj:**

Sebastian Bremser

Koran Bonvenon!

## Esperantujo kaj Politiko

**Historio kompare al hodiaŭ** Opinio de Georg Hennemann

La batalo de Annual la 22-an julio de 1921 en norda afriko markas eventon kun vastaj implicoj. La ŝoko pri la fiasko estis tiel granda ke poste la armila elspezo estis pligrandigita kaj englulis trionon de la hispana nacia buĝeto. En 1936, la puĉo de Francisco Franco kontraŭ la hispana registaro komenciĝis en hispana maroko, kaj kun ĝi la hispana enlanda milito.

La 1-an de novembro 1936, do antaŭ 86 jaroj estis publikigita la unua eldono de la ‚Popola Fronto‘ kun subtitolo “Informa Bulteno Internacia pri Hispana Lukto kontraŭ la faŝismo”.



Oni povas sin demandi kiel la tiama situacio en Hispanio malsamas de la situacio nuntempe en Ukrainio. Tiam la agreso venis de enlanda kaj koloniisma militistaro, inter ili antidemokrataj kaj antisocialistaj generaloj kaj oficiroj kiuj helpe de okcidentaj imperialistaj ŝtatoj, precipe per subteno de faŝistaj trupoj el Germanio kaj Italio, puĉis kaj batalis kontraŭ la propra popolo. Tiam granda subteno por la hispana respubliko venis el Sovetio helpe de mono kaj pafiloj. En la tiel nomataj ‘Internaciaj brigadoj’ batalis homoj el la tuta Eŭropo kontraŭ imperialismo kaj faŝismo. Nun Ukrainanoj batalas kontraŭ imperialista

Ŝajndemokrata reĝimo kiu volas aneksi sudorientan parton de ilia lando kaj ŝanĝi la demokration elektitan registaron, vidu ekz [https://e-d-e.org/IMG/pdf/EDEFed\\_Ukrainio.pdf](https://e-d-e.org/IMG/pdf/EDEFed_Ukrainio.pdf) . Kiel tiam en Hispanio nun ne estas tempo por debato sed por ago. Bezonatas reĝimoŝanĝo en Rusio: Neeblas serioze intertrakti kun registaro de kontraktrompisto. Sed estas ne nur la Kremlo mem kiu respondecas - ankaŭ granda parto de la rusianoj subtenis la t.n. militajn operaciojn, kaj tio kvankam Rusio garantiis la sendependecon, la suverenecon, kaj la ekzistantajn limojn de Ukrainio subskribinte la Budapeŝtan deklaron de 1994. Pro tio ia ajn indulgo, oportuneco aŭ kvietiga politiko, kiel la tiam „appeasement”(trankviligo)-politiko de Anglio kaj Francio kontraŭ Hitler-Germanio estas nura iluzio. Necesas komuna kaj forta reago de ĉiuj Eŭropanoj kaj daŭra subteno de la ukraina popolo.

La bulteno ‘Popola Fronto’ estas grava atesto kaj historia dokumento pri la hispana enlanda milito, kaj la kompleta kolekto estas elsutebla de <http://bibliotekomolera.org/popolafronto.html>

Ligiloj:

<https://www.sozone.de/2016/02/revolution-und-buergerkrieg-in-spanien-i/>

<https://www.sozone.de/2016/03/revolution-und-buergerkrieg-in-spanien-teil-ii/>

<https://www.bpb.de/kurz-knapp/hintergrund-aktuell/231078/vor-80-jahren-beginn-des-spanischen-buergerkriegs/>

## Literaturo

de Felmano Ulriko

La rakonto pri la kukurboj

En Ŝlarafolando, la gresejo konsistas el sukerharoj, sur la arboj kreskas kolbasoj aŭ ĉokoladaĵoj, pluvas viandbuloj, kaj bakitaj kolomboj aŭ legomoj flugas al la buŝoj de malsataj homoj, depende ĉu ili estas vegetaranoj aŭ ne. Riveroj konsistas el vino. Kaj la urboj, ili konsistas el kukoj, la muroj, la domoj, la monumentoj. La urboj estas kuk-urboj.

Iam, la reĝo de Kazeokukurbo ne kontentis, ke li regas nur unu urbon, kaj ĉiam povis manĝi nur kazeokukon. "Mi volas ankaŭ manĝi ĉokoladokukon!" li diris, kaj ordonis starigi armeon por konkeri Ĉokoladokukurbon.

Intertempe, la reĝino de Ĉokoladokukurbo ne kontentis pri sia limigiteco al ĉokoladokuko. Ŝi emis manĝi ankaŭ fragokukon!

Simile pensis la registroj de Buterkukurbo, Fragokukurbo, Persikokukurbo, Saĥerkukurbo kaj ĉiuj aliaj kukurboj. Estis kvazaŭ kiel epidemio – ĉiu ne plu volis manĝi nur la tradicie propran kukon. Do ili ĉiuj invadis siajn najbarojn, kun soldatoj, kiuj pafis terpombulojn, salatkuglojn kaj ĉokolade kovritajn karotgranatojn. La loĝantoj ne vundiĝis per tiuj objektoj, sed diris: Kiu povas ĉion tion manĝi!

Tamen la kukaj kasteloj de la gereĝoj estis dum tiu ŝlaraflanda milito komplete detruataj, kaj la ŝlaraflandanoj konvinkiĝis, ke oni ne bezonas tiajn registrojn. Estus pli bone fondi respublikon, konsistonta el ĉiuj kukurboj. Ili faris baloton, voĉdonis majoritate por la manĝokratio, kaj poste organizis grandan feston kun multe da bongustaĵoj.


Kaj se ili ekde tiam ne finiĝis manĝi kaj trinki, la tuta kukurbaro festadas ankoraŭ hodiaŭ.

Postskribaĵo: leginte la rakonton eonojn pli poste, la franca esperantisto Paskalo Vileno skribis al mi la jenan leteron:

Mi memoras, ke mi iam vizitis iun el ĉi tiuj kukurboj. Surprizis min, ke tie neniu rajtis organizi kurkonkurson. Se tamen iu intencis malobei kaj ekplanis kuron, tuj estis instalitaj kurbaroj facile videblaj danke al granda litero "Q" (Kial Q? Tion mi neniam eksciis!). Ĉiu el tiuj baroj estis nomita "Q-kurbaro" (prononcu: kukurbaro). En la tuta kukurbo estis do kukurbararo!

**Librorecenzo** (de Georg Hennemann):

**Pantopia**, sciencfikcia verko de la germana aŭtorino Theresa Hannig



Mi ĵus legis la sf-romanon "Pantopia" (germanlingve) kaj estas ege impresata de ĝia ideoriĉa agado. Rezumo: Pli bona mondo eblas! Theresa Hannig verkis utopian romanon por nia tempo: Efektive, Patricia Jung kaj Henry Shevek nur volis skribi aŭtonomian komercan programaron, kiu funkcias bone por altfrekvenca komerco je la borso. Sed eraro en la kodo kreas la unuan fortan artefaritan inteligentecon (AI) sur ĉi tiu planedo, kaj ĉar unue ili pensis ke ili faris koderaron la du programistoj nomas tiun AI-

personecon 'EinBug' ("komputila cimo"). Einbug rapide rimarkas, ke por pluvivi, li devas ne nur pli bone ekkoni la homaron, sed ankaŭ ŝanĝi la mondon. Kune kun Patricia kaj Henry, li do fondas la mondan respublikon Pantopia. La celo: la forigo de naciaj ŝtatoj kaj la universala efektivigo de homaj rajtoj. Kiu estus pensinta, ke ili sukcesos kun ĉi tio? "Venu al Pantopio. Ĉiuj estas bonvenaj ĉi tie!"

## Diversaĵoj

Enigmo (sendita de Gundhild):

En strato en malgranda urbo ekzistis kvar tajlorejoj.

Super la unua estis ŝildo: *La plej bona tajlorejo de nia urbo*

La ŝildo de la dua tekstis: *La plej bona tajlorejo de nia lando*

Super la tria tajlorejo estis ŝildo: *La plej bona tajlorejo de la mondo*

Kiel vortiĝis la ŝildo de la kvara tajlorejo?

(Solvaj sekvos en la venonta ei.)

## Proverbo de la monato

La zamenhofa proverbo, kiun mi hodiaŭ prezentas estas:

**Estinta amiko estas plej danĝera malamiko.** (Estintaj amikoj plej kruele malpacas.)

La signifo estas evidenta: Se vi ekkverelas kaj malpaciĝas kun amiko, la ofendiĝemo ambaŭflanke estas pli granda ol kun persono nekonata.

## Anekdoteto

Juristo kun sia amikino en lito en la nokto de 30-a oktobro. Ŝi (frustita): "Mi certas, ke vi ĝuste nun pensas pri alia virino." Li (distrita): "Se ĝemelo naskiĝas je 2:56 a.m. dum la tempoŝanĝo, kaj tiam la horo estas ŝanĝita de 3 a.m. al 2 a.m. kaj tiam la alia ĝemelo naskiĝas - ĉu la pli juna ĝemelo tiam oficiale estas la pli maljuna ĝemelo?"

--